## Kunsido de la Estraro de UEA, Roterdamo, 23-26 aprilo 2015 - raporto

Universala Esperanto-Asocio

ESTRARA KUNSIDO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara komuniko EKO 2015-16 sendita la 2an de majo.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

## Resumo de la dua tago

La kunsido okazas en la 23a, la 24a kaj 26a de aprilo, kun paŭzo en la 25a por la Malferma Tago de la Centra Oficejo, kie aktivis la estraranoj. Partoprenas la kunsidojn Mark Fettes (MF), Martin Schaeffer (MS), Barbara Pietrzak (BP), Lee Jungkee (LJK) kaj Stefan MacGill (SMG). Ne povas partopreni Stefano Keller (SK) kaj José Antonio Vergara (JAV). Ĉeestas parttempe la direktoro de la CO (Osmo Buller) kaj Pasquale Zapelli (PZ).

Por raporto pri la unua kunsida tago, bv. turni vin al EKO 14.

## Konsciigo (reveno al la temo)

**Retaj informejoj**
Gravas regule testi retligojn en niaj informpaĝoj kaj organizi riparojn de misaj– tasko por volontulo.

**Tutmonda Inform-Reto (TIR)**
Devas viviĝi. AMO-seminariintoj povus ricevi inviton aktivigi TIRon. Rilatas al tio la bezono pli zorge trakti la partoprenlistojn de seminarioj -- tasko plenumebla kiam AMO havos apartan administranton.

**Eksteraj rilatoj**
Dezirinde kunigi landojn kun forta enlanda Unesko-agado en iun laborgrupon. TEJO bone agadas ĉe Eksteraj Rilatoj, Veronika Poór sekvos retkurson de ESF en majo.

**Trejnado: Ĝenevo, Parizo, Novjorko**
MF: ni havu seminariojn por trejni homojn por reprezentaj celoj. Necesos krei trejnprogramon. Bezonatas pretigo de reprezentaj materialoj kune kun gvidilo. TEJO havas gvidilojn kaj retkursojn por tia trejnado. Kunsido okazu en Nitra aŭ dum nia printempa estrarkunsido. MF ekigos la aferon pere de la KRIO-listo.

**Centro pri Esploro kaj Dokumentado**
Roland Rotsaert (BE) eniris la estraron de CED kaj respondecos pri organizado de komuna katalogo por ĉiuj bibliotekoj.

## Kunsido de la Estraro de UEA, Roterdamo, 23-26 aprilo 2015 - raporto

**Monda Eduka Forumo, Koreio**
Tio bezonos materialojn, en Koreio oni pretigas multon, kiu povos havi postan utilon (bildo en la PDF). LJK poste pretigu internan raporton pri la sperto, por helpi al aliaj reprezentiĝoj. ILEI pretigis serion da dulingvaj informiloj, LJK prizorgos Eo-Korean version.

**Indekso de lingva justeco – progreso**
MF pretigis subvencipeton, rezultoj venos junie.

# Kunordigo:

### Landa kaj regiona agado

Starigo de helpejo kaj helpiloj por novaj landaj asocioj volantaj aliĝi al la Asocio.
La regulaj komunikoj al Landaj Asocioj k.m.a (53 en 2014, 15 en 2015) estas nun legeblaj en la parto 'Komunumo' ĉe www.uea.org/vikio/index.php

### Afriko
La gvidanto de la Afrika Komisiono, Adje Adjévi, multe korespondas, malpli certa estas la aktiveco de la tuta Komisiono. Estas aliaj grupiĝoj, kiuj volus pli proksiman kunlaboron, kaj pledas por forlaso de la nuna strukturo. La deziro pri unuecigita movado subtenindas, sed malcertas kiel procedi.  MF petos komentojn de AK pri tiuj evoluoj.  LJK: UEA subtenu la propran Komisionon. Ĝi ja havas membrojn el ĉiu ĉefa parto de la kontinento, kaj ĉiuj membroj estas afrikanoj (ja unu loĝas en Kanado). Neafrikanoj havas nur konsilan rolon.

### Ameriko
MS raportas. JAV ne povas skajpi pro la vulkana erupcio. MS trovas la komisionon ne tro forta; ĉefe el Nikaragvo, Kubo kaj Kolombio aktivas komisionanoj. Brazilo aktivas, sed enlande. Maritza G. el Kubo kunlaboras kun meksikanino pri kunagado en Amerika Asocio, deziro estas sendi Maritza al Salvadoro: tio kostus ĉ. USD500. MS rekomendis al ili fari peton al ESF kaj UEA.  Pli forta gvidanto serĉinda.



### Azio
Netraktita ĉar LJK kaj MF okupiĝis intense tra la lasta semajno (vidu en EKO 15).

### Eŭropo
Netraktita ĉar teksto por la Estrara Raporto kovras la terenon.

**Mez-Oriento kaj Norda Afriko (MONA)**
SMG sekvos la evoluon kaj multe varbos por la 9a Mezorienta Kunveno  en Turkio.

**Oceanio**
Tiu komisiono malaktivigis sin. Diskutita la fondo de aparta Sud-Orientazia Komisiono, eventuale ĝis Bandung en marto 2016, kiu enprenu la Oceanian regionon. KAEM proksime kunlaboru kun la nova komisiono. OB:  la regionaj komisionoj estas Estraraj, do facile modifeblaj.

### Centra Oficejo: Oficistoj kaj oficejaj taskoj

OB raportas, la stabo estas stabila, ĉefa bezono estis trovi solvon por JL post la emeritiĝo de Roy McCoy.  Diskuto pri ebloj aperigi afiŝon iuspecan sur la fasado de CO, esplorotaj eventualaj kostoj postulataj de la urbo.

## Kunsido de la Estraro de UEA, Roterdamo, 23-26 aprilo 2015 - raporto

**Volontuloj**
Oni povas akcepti maksimume du, loĝigo problemas, se oficisto devas loĝi en la CO; nova ĜD normale loĝus en la CO dum la prov-periodo. Nikaragvano volontulos monaton post IJK. Diskuto pri la rendimenteco, ke UEA aĉetu domon apud CO, por volontuloj kaj estraranoj dum kunsidoj. PZ klarigas diversajn obstaklojn kaj postulojn. La Estraro petas pretigon de analizo pri la (mal)avantaĝoj kaj imageblaj kostoj.

**Reteja prizorgo**
Malfortas la nuna servilo; ripari tion kostus. PZ petita raporti la kostojn duobligi la kapaciton – de la servilo kaj retaliro. Sed povas esti aliaj faktoroj influantaj rapidecon. Nova retejo povus esti ekster CO, sed PZ volus konservi la administrajn partojn en la CO. Necesus iel solvi la nunan staton de <uea-membroj>. Foruma paĝaro povus doni bonan solvon. MF esploros. Kiam funkcios, ni fermu la nunan liston ĉe Yahoo.

**Estrara labormaniero kaj taskodivido**
SMG: La teama aliro por Movado kaj Mondo apenaŭ funkcias; mankas fortoj aktivigi tion. Sed ĉiu agas laŭ propraj kampoj, komunikado intensas. La teknikaj kvalitoj de skajpado estas variaj – foje konsternaj. Dezirata pli frua konigo de la tagorderoj. LJK: Homoj demandas pri la ritmo de estrara komunikado. SMG: La dumonataj raportoj de ES al la Komitato devas informi pri la skajpkunsidoj diversspecaj (Estraro, Mastruma teamo, kun Konsilio, kun TEJO…).

**Financaj kaj teknikaj bezonoj**
SMG: tre bonvenus sekretarieca helpo por estraranoj, unuope aŭ kolektive. Tio malpli necesus se diversaj projektoj ekhavus administrajn fortojn. Gravas provadi plie aktivigi Konsilianojn per kontretaj petoj, eĉ se ĉiu jam ege aktivas diverskampe. Oficejeto por Movada Evoluigo mildigus la troŝarĝitecon de estraranoj. Perspetive, devus ebli taski COn pri iuj evoluigaj taskoj – ĉefe administraj. Esplorindas uzo de *Trello* aŭ simila por mastrumi la laborojn. Forumo havu ankaŭ retbazaron por altiri kunlaboremulojn.

**Estrara Raporto 2014 – kompletigo**
Tio estas grandparte kompilita. Konsentite kiel procedi por fermi la raporton. Konciza 4-paĝa resumo aperos en la junia revuo *Esperanto*, kune kun la financaj raportoj (plusaj du paĝoj). SMG respondecos pri 'Kapabligo' MF pri la cetero. La plena raporto estos rete disponigita, celata estas longo ne pli ol la pasintjara.

tejo

*Nico Huurman estas la reprezentanto de TEJO en la sekva sesio.*

**Evoluo de TEJO**
TEJO sukcesis enigi siajn estraranojn al gravaj postenoj en la Eŭropaj junularaj movadoj, kio signifas, ke gravus sekvi pli proksime la postulojn pri membreco de TEJO en tiuj organoj.

**Ŝanĝoj en la TEJO-regularo**
Tio gvidas al la propono starigi kategorion de simpatiantaj membroj por ligi pli altan nombron da junuloj al TEJO. La dua aspekto estas restrukturado de la nuna reglamento, por liveri ion, kio povos funkcii kiel akceptebla Statuto. La forfaligitaj eroj transiru al interna reglamento aŭ al Interkonsento aŭ Kontrakto inter UEA kaj TEJO, kiu spegulu la realan interrilaton, kaj estu modifebla nur kun konsento de ambaŭ partioj. Nuligo ja eblas unuflanke. Ambaŭ komitatoj devus aprobi la plenan tri-dokumentan pakaĵon. La membrokategoria demando aperos en iuj el la dokumentoj.

## Kunsido de la Estraro de UEA, Roterdamo, 23-26 aprilo 2015 - raporto

La aspiro estas aprobigi la pakaĵon en Lillo kaj Wiesbaden, do tre strikta tempo-skemo. Kiel eble plej baldaŭ la Laborgrupo starigita en Rejkjaviko (MS, MBM, NC, RZ, kun BM kiel faka konsultanto) ricevu la dokumentaron laŭeble kun klarigoj pri la esencaj ŝanĝoj, poste la Komisiono pri Regularoj en UEA (Brian Moon, Ulrich Lins) devos ricevi la dokumentaron. La propono iru al Komitatanoj en unu el la fizikaj sendoj. La propono venu al la unua sesio (sabate), kiu povos pludoni ĝin al Komisiono, cele al fina akcepto en la ferma vendredo.

La deklaro 'ĉiu membro de TEJO estas aŭtomate membro de UEA' povus postuli modifon de la Ĝenerala Regularo de UEA. La membro-kategorioj ne estas difinitaj en la proponata Statuto de TEJO; tio staras en la nova Reglamento. Eblus peti nur la modifon de la dokumentoj sen la propono pri simpatiantaj membroj. La tempo en Lillo estos limigita.

**Kunlaboro kaj komuna strategio**
TEJO kontentas pri la kunlaboro kun UEA. MF: Du ĉefaj kampoj, kie kunlaboro povos esti pli proksima estas Eksteraj Rilatoj (proponata komuna kunsido en iu reprezente grava urbo), la alia Regiona Agado (precipe pri Afriko kaj Azio). LJK raportas, ke junulara sekcio estas ĵus fondita en Ĉinio, reage al la Azia Forumo. Necesus ellabori manierojn por kunlaboro inter UEA kaj TEJO, inkluzive de fizikaj kunvenoj. SMG: Ebloj por AMO-seminario en IJK (aŭguste) kaj JES (decembre – kun stipendiado de regionanoj).

## Membraro

**Membrostatistiko**
Ĉiu ricevis la rezulton 2014. Eta kresko, sed ĉefe en MJ kaj MG. La kongreso bonigos la rezulton por 2015, sed tio estas efemera rezulto. Kiel kreskigi la fluon, precipe en la revuhavaj kategorioj.

**Membrovarba strategio**
Dum iu tempo, CO pretigis komunikon por MG, kun eroj el Gazetaraj Komunikoj (GK) kaj la revuo. Sed tro temporaba por kompili. Por ricevi GK kiel unuopulo oni devas peti. Nun kiel MG oni rajtas enrigardi la retan RE. MS: Ĉu konsiderindas doni variajn UK-rabatojn: ekz. €40 por MA, 20 por MJ kaj 10 por MG. OB: komplike por administri. Nitra donus bonan okazon eksperimente enkonduki ŝanĝon. OB: pli gravas pensi kiel reteni membrojn ol varbi novajn. Foje oni sendis la kongresan RE al la ne-MA en la kongresa lando, aŭ al aliaj landoj. Unue, la numero devos esti konvena por tia sendo, decidende por 2015 ĉu sendi al ne-MA en Francio (iom multaj) aŭ eĉ pli vaste. MS/SMG: Indus rete sendi memorigojn pli frue ol la papera atentigo de majo (kaj refoje en oktobro por la sekva jaro). Tiaj memorigoj enhavu libro-oferton aŭ similon.

**Videbligo en kongresoj kaj aliaj aranĝoj**
Budo-materialo. Kiu pretigu tion? Banderoloj, afiŝoj, donacetoj (plumoj, kalendaroj,…)

Vortoj: 1550

*Raporto pri Financoj kaj la Kongresoj sekvos en aparta EKO-komuniko. Paciencon!*

*Pli ilustrita versio de ĉi tiu raporto eventuale sekvos.*

*PDF kreita de Nuance Power PDF en la 2a de majo, 2015*